


La Espero

2007:3

Maritza el Kubo parolis pri Esperanto en Svedio



Dum kelkaj tagoj komence de majo, Maritza Gutierrez González el Kubo vizitis Svedion. Ŝi konatiĝis kun la esperantokluboj de Stokholmo, Gotenburgo, Västerås kaj Södertörn (Haninge-Tyresö), kaj estis intervjuita aŭ prelegis en la hispana pri esperanto.

*En la bildo: Aino Åberg, Maritza Gutierrez Gonzáles Siv Burell kaj Helfrid Karlsson. Fotis: Anita Dagmarsdotter.
Legu plu sur paĝo 3.*

Några dagar i början av maj besökte Maritza Gutierrez González från Kuba Sverige. Hon lärde känna esperantoklubbarna i Stockholm, Göteborg, Västerås och Södertörn (Haninge-Tyresö), och blev intervjuad eller föreläste om esperanto på spanska. På bilden: Aino Åberg, Maritza Gutierrez Gonzáles Siv Burell och Helfrid Karlsson. Foto: Anita Dagmarsdotter.

Läs mer på sidan 3.

Organ för Svenska EsperantoförbundetISSN 0014-0694
Junio 2007 • 95-a jarkolekto
Fondita en 1913**Redaktion:** Leif Nordenstorm**Frågor om prenumeration o. dyl.:**Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00**E-post:** esperanto@globalnet.net**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde**Prenumeration 2007:** 200 kr.Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00**E-post:** sef@esperanto.se**Nätsida:** www.esperanto.se**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet**Medlemsavgift 2007:**Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG**Postgiro:** 578-5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona/**E-post:** eldona@telia.com **Telefon:** 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,**Nätsida:** www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se**Telefon:** 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@globalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

La plej bona Loko

Daniel Salomon kaj Olof Olsson kaj www.laloko.org**La Loko estas tegmenta nomo por kelkaj projektoj, kiujn Daniel Salomon kaj Olof Olsson realigas en diversaj sferoj. Hodiaŭ ili respondas al niaj demandoj.****Daniel:** Mi estas Daniel Salomon. Mi naskiĝis en 1976 en Danio. Mi kreskis en Francio, studis arton en Francio, Danio kaj Germanio. La pasintan jaron mi loĝis en Londono. Nuntempe mi ne scias, kie mi loĝas.**Olof:** Mi estas Olof Olsson. Mi naskiĝis kaj kreskis en Svedio, sed mia patrino estas nederlanda. Mi studis la anglan lingvon, filozofion, fotografion kaj arton. Nuntempe mi loĝas en Kopenhago.**Kiam kaj kial vi lernis Esperanton? Ĉu vi iel utiligis Esperanton en la antaŭLoka epoko?**

Ni ĉiam sciis ke esperanto ekzistas, sed ni neniam sentis la urĝon lerni ĝin ĉar ne montriĝis bezono. Unu tagon hungara amiko de Olof plendis pri la fipremanta devo komuniki anglalingve. Tio kaŭzis, ke reflektado pri lingvo kaj ĝia efiko al ni homoj eniris la konversacion, tra niaj pensoj, sentoj kaj ŝercado. El tiuj tri aferoj konsistiĝas la motoro de la arta proceso – fulmideoj. (La interrilato ne estas logika aŭ antaŭkalkulebla tamen fundamente nepra.) En la formo de tia fulmideo naskiĝis La Loko.

Ni ekuzis esperanton per La Loko kaj ekigis La Lokon per esperanto. Ke ekzistas komunumo da parolantoj ni ne sciis kaj ankaŭ ne pridemandis. Jam antaŭe ni havis la ideon startigi projekton, kiu havas tutneŭtralan deirpunkton, bazon, kiu penetras ĉion kaj povas esti rilatigata al ĉio. Esperanto ofertigis kiel la fadeno, kiu havas la potencon kunligi projektojn kaj ideojn pri la plej diversaj aspektoj de la vivo kaj la plej diversaj spacoj en la kosmo, ĉu realaj aŭ konstruitaj. Esperanto aperis al ni ne nur kiel lingvo, sed kiel fenomeno, filozofio kaj vivstilo. Kompreninte ĝian potencon, lerni ĝian eksteran formon estis nur rime-do materialigi ĝian esencon.

Kion celas La Loko?

La Loko estas laboratorio, kiu ekzistas en materiala kaj interdimensia sfero. Pro tio ĝiaj funkcioj estas nedifineblaj kaj senlimaj – tio, kion oni enmetas, trairas proceson de transformiĝo kaj elvenas produkto tutnova, kreiginta laŭ la sama principo kiel fulmideo. Same kiel esperanto, La Loko estas platformo, sur kiu eblas

priskribi ĉiajn enhavojn de la universo. Kelkaj kampoj, kiujn ni jam esploris, estas filmado, gastronomio, arkitekturo, danco, desegnado, komunikiloj, sporto, politiko kaj konversaciado.

Rilate al la konkreta rolo, kiun ĝi havas por la esperantista komunumo, ni povas diri la sekvan: "Esperantujo" estas mondo, kiu ekzistas en la kapoj de homoj kaj iĝas reala nur per interretaj projektoj aŭ dum kongresoj. La Loko kreas realan esperantan universon, kun esperantaj objektoj, manĝaĵoj, komunikiloj, ejoj kaj vivstilo. Esperanto iĝas tuŝebla, gustumebla, spertebla per ĉiuj sensoj de la homa korpo.



Ĉu la Esperanto-teamo de futbalo?

La Loko famiĝis en Esperantujo per la kampanjo por Esperanto-teamo en la futbala mondopokalo 2010.

Ni kampanjas por ke la Esperanto-teamo partoprenu en la Mondpokalo de FIFA en Sud-Afriko en 2010. Disvastiĝis la informo, ke la projekto estas nur truko por altiri la atenton de la amaskomunikiloj al esperanto. Sed tio nur estas kromefiko. La fakta celo estas kunligi la idealisman lingvon esperanto, kiu alparolas ĉefe intelektulojn, kun sporto, kiu movigas homamasojn, ekigas emociojn, fanatikecon kaj identiĝon. Sed, male al la strukturo de la ĉampionado kiu tradicie baziĝas sur patruja fiero kaj patriotismo, ni proponas al la ludantoj kaj fervoruloj futbalon sen nacia ŝovinismo. Nia teamo elstaras ĉar ĝi apartenas al neniu lando sed tamen integriĝas en la spiriton de la ludoj.

En via retejo estas listigitaj pliaj projektoj: Ovo, Kolbasoj sen limoj, la rekta metodo, la amikeco-konferenco en Tajlando k.a. Bonvolu rakonti:

Ovo ekzistis en majo-junio 2005.

Daŭriĝo en *paĝo 8*.

Maritza el Kubo parolis pri esperanto en Svedio

Dum kelkaj tagoj komence de majo, Maritza Gutierrez González el Kubo vizitis Svedion. Ŝi konatiĝis kun la esperantoklubo de Stockholm, Göteborg, Västerås kaj Södertörn (Haninge-Tyresö), kaj estis intervjuita aŭ prelegis en la hispana pri esperanto.

La Sved-kubana asocio en Stockholm invitis siajn membrojn al prelego pri kultura egaleco kaj esperanto, kaj ĉar la ĉeestantoj estis hispanlingvanoj, la prelego okazis en la hispana.

La partoprenantoj havis proprajn spertojn pri kultura kaj lingva malegaleco, kaj faris demandojn pri esperanto. Inter la ĉeestantoj estis reprezentantoj de la kuba ambasado. Kelkaj el la partoprenantoj rakontis pri pli fruaj kontaktoj kun esperanto.

Ankaŭ la esperantoklubo de Västerås aranĝis kontakton kun loka sved-kuba asocio, kaj Maritza rakontis pri esperanto kaj pri Kubo. Ŝi adaptas la enhavon de la prelego al demandoj de la aŭskultantoj, kaj havas profundan scion pri ambaŭ temoj, nome scion pri la lingvaj cirkonstancoj kiuj kondukas al la ideo pri esperanto, kune kun pedagogia prezento de la lingvo esperanto, kaj ankaŭ scion pri kulturo, produktado, ekonomio, geografio kaj turismo en Kubo.

La esperantoklubo de Göteborg mallonge kontaktigis Maritza kun reprezentanto el societo de enmigrintoj, sed ĉefe utiligis ŝian viziton por partopreno en la lasta sesio de la seminario, kiuj preparis por ekzameniĝo. La vizito donis taŭgan eblecon paroli en esperanto pri pluraj temoj.

Danke al la kontaktoj de la esperantoklubo en Västerås, Maritza estis intervjuita dum tuta horo pri esperanto en la hispana por la loka sveda radio en Västmanland. Por tiuj kiuj havas taŭgan ekipon, la intervjuo estas aŭdebla ĝis komenco de junio en interreto (www.sr.se/vastmanland, klaku je Lyssningsarkivet kaj serĉu lundon 7 majo je 15 h). Maritza mem laboras en la kuba radio per esperanto-elsendoj, kaj rakontis pri sia laboro en la intervjuo.

En UEA (Universala Esperanto-Asocio), Maritza havas la funkcion de estrarano pri landa kaj regiona agado, kaj kiel tia, ŝi havas kontakton kun ĉiuj landaj asocioj. Dum la vizito al Svedio, ŝi renkontis duonon el la estraranoj de la Sveda Esperanto-Federacio. Ŝi ankaŭ havas funkcion en la internacia ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj), kaj renkontis

gravan parton el la teamo de "lernu.net", kiuj loĝas en la proksimeco de Stockholm, kaj faris viziton al la lingvistika institucio de la universitato de Stockholm, kiu aranĝos kurson pri esperanto aŭtune. Ŝi prelegis pri Kubo en la esperanto-klubo de Stockholm, kaj vizitis la muzeon de la naturparko en Tyresta kune kun laborgrupo el la klubo de Södertörn.

La viziton de Maritza kunordigis laborgrupo en Haninge kaj Tyresö (la klubo de Södertörn). La tempo estis limigita, kaj la ekzaktaj datoj estis malfrue fiksitaj, kaj tial ne eblis plenumi la deziron de aliaj kluboj pri vizitoj. Pli ol dudek membroj de SEF en la vizitaj kluboj aktive kontribuis al eksteraj kontaktoj, financoj, administrado kaj aranĝo de kunvenoj dum tiuj tagoj komence de majo.

Krom vizito al Svedio, Maritza faris similan vojaĝon al esperantoklubo en Francio, post la estrarkunsido de UEA en Nederlando meze de aprilo. Estis la tria fojo, ke ŝi faris rondvojaĝon en eŭropaj landoj kunlige kun estrarkunsido. En pli frua jaro ŝi vizitis Japanion por prelegvojaĝo.

Ulla Luin

Estimataj samideanoj!

Kiam mi redaktas tiun ĉi numeron de La Espero okazas Sveda Esperanto-Kongreso en Lesjöfors. Mi ne havis eblecon veturi tien, sed mi tamen pensas pri vi, kiuj estas tie. En la ventonta numero de La Espero ni atendas raporton.

Mi mem laboris pri alia projekto. Antaŭ kelkaj jaroj mi verkis libron "Doktor Zamenhof och det internationella språket" en la sveda lingvo. Baldaŭ eldoniĝos dua eldono. En ĝi kunlaboris ankaŭ Christer Lörmemark, kiu estas lingvisto. Espereble ĝi povis krei intereson pri Esperanto inter diversaj homoj. Ni kontrollegas tiun libron ege intense. Preseraroj estas tre ĝenaj en libroj.

En gazetoj kaj revuoj preseraroj bedaŭrinde preskaŭ ĉiam enestas. Neniam estas sufiĉe da tempo por kontrollegi revuon same bone kiel libron.

Kiam mi verkis la redaktorajn kolumnojn de La Espero 2007:2, la temperaturo ĉe ni en Boden estis - 27 C. Nun niaj razenoj estas verdaj. Nia lando vere havas ŝanĝigantajn kaj variajn sezonojn. Kiam mi havis japanajn esperantistajn amikojn ĉe mi ili opiniis ke Svedio kaj Boden estas mirindaj. Eble mi nun komencas kompreni kial. Agrablan someron!

Via redaktoro



Maritza Gutierrez González och Helfrid Karlsson. Fotis: Anita Dagnarsdotter.

Esperanto-Gårdens vänner

EGV är en internationell och ideell förening vars målsättning är att hjälpa till med utvecklingen av Esperanto-Gården.

Hjärtligt välkomna till Esperanto-Gården, som är ett kooperativ bestående av över 400 personer och organisationer från ett 30-tal länder. Den självständiga föreningen Esperanto-Gårdens Vänner, EGV, vill informera om det unika språket Esperanto, ge stöd till Esperanto-Gården och främja bygdens turistutveckling.

Personalen i Esperanto-Gården arbetar ideellt och svarar gärna på frågor om Esperanto och annan verksamhet. Varje år har vi en sommarkurs under vecka 26. Du är välkommen hit både till den och vid andra tider.

Du själv, din familj eller föreningen kan bli medlemmar i EGV. Årsavgiften är endast 10,- kr för vuxna. En familj med gemensam adress betalar 20,- kr. För en förening är avgiften 100,- kr. Du/ni bestämmer själva ni vill vara passiva medlemmar eller vara aktiva på något sätt.

En del aktiva medlemmar använder gärna det internationella språket Esperanto som kontakt-, arbets- och informationsspråk - men det går lika bra med svenska eller något annat språk. Verkliga vänner försöker överbygga språkförbistringen.

Internet-information finns på www.e-g.se

Esperanto fick stjärna

Stockholmskrogn Esperanto fick sin första stjärna i årets upplaga av krogguiden.

Alla svenska restauranger som fick stjärnor förra året behåller sina utmärkelser i Guide Michelin Main Cities of Europe 2007. Det betyder att Edsbacka krog norr om Stockholm behåller sina två och att 28+, Basement, Fond och Sjömagasinet i Göteborg är enstjärniga restauranger precis som Fredsgatan 12, Lū Stockholm, Mistral och Operakällaren i Stockholm.

Förändringen jämfört med förra året är att drygt ett år gamla Esperanto i centrala Stockholm får en stjärna. Restaurangen har genomgående fått

mycket bra kritik i tidningarnas krogguider och svenska White Guide skrev nyligen att "mycket på Esperanto är direkt i världsklass".

Enligt Guide Michelins kriterier betyder tre stjärnor att restaurangen är värd en resa i sig, tvåstjärniga krogar är värda en omväg och de enstjärniga är exceptionellt bra i sin kategori.

Sverige är det nordiska land som har flest stjärnrestauranger i Guide Michelin.

På Stockholms universitet

Institutionen för lingvistik på Stockholms Universitet kommer att ge en grundkurs i esperanto under läsåret 07/08. Kursen kommer att gå på halvfart, ge 20 poäng (30 högskolepoäng) och bestå av följande delkurser:

1. Introduktion till esperanto, 7,5 hp
2. Interlingvistik och konstruerade språk, 7,5 hp
3. Fördjupning i esperanto, 11 hp
4. Realia (om esperantorörelsen, dess litteratur mm), 4 hp

Kursen är till stora delar internetbaserad (<http://.lernu.net>) med ca en träff i veckan på kvällstid.

Lärare på kursen: Hartmut Traummüller (professor i lingvistik), Sonja Petrovic (studerar lingvistik och jobbar med lernu.net) och Håkan Lundberg (jobbar med lernu.net).

Om du har ngn fråga angående kursen så skriv gärna.

Hokan (hokan@ikso.net)

Samer i Esperantoprojekt?

Visste du att UEA har ett projekt för ursprungsfolk, PIP - Projekto Indigenaj Popoloj, som ger ut en nättidning: La Kalumeto (Fredspipan) www.uea.org/vikio/La_Kalumeto

Av världens ca 300 miljoner ursprungsfolk är 70 000 samer. Samerna är Europas enda ursprungsfolk.

Åter till La Kalumeto. Den har hittills kommit ut med två nummer. I La Kalumeto 2 skriver Erik Felker, att esperanto skulle kunna göra det möjligt för människor från olika ursprungsfolk att ha kontakt med varandra via internet. Erik Felker uppmanar därför dem, som tycker det är värt att möj-

liggöra samarbete mellan ursprungsfolk i hela världen via esperanto, att kontakta honom.

FN:s arbetsgrupp för ursprungsfolken höll sitt första möte 9 augusti 1982. Denna dag är också ursprungsfolksdagen. Sedan 2002 träffas representanter för ursprungsfolken i FN:s permanenta forum för ursprungsfolk.

Du som är intresserad kan hjälpa till att genomföra ett temaarbete om samer i samband med den planerade Mullsjökursen 6 - 10 augusti (se anons!) Dessutom kan man uppmärksamma 9 augusti - ursprungsfolkens dag!

Informationen om PIP har bland annat spritts till alla ordförande i ILEI-sektionerna. Därav mitt engagemang.

Siv Burell

Diversaj aktivecoj

En "Ponto", la organo de Suna Esperanto-Agado, ni povas legi ke dek aliĝis al komencantula kurso en Helsinborgo kaj ke ok restas. La Lundanoj raportas ke La Espero nun legeblas en la urba biblioteko. El Malmö oni raportas ke oni havas diversajn komitatojn en la klubo: redakta komitato, teknikaj aferoj, biblioteko kaj arkivoj, bild- kaj fotokomitato, komputilaj aferoj, gazeteltondantoj, prizorganto de la klubejo, elektoprepara komitato kaj komitato por la printempa festo.

En "Ekspreso" de Esperantoklubo de Stokholmo ni povas legi ke en la printempo oni akceptos vizitanton el Kubo kaj havos kantovesperon. En la somero la klubo vizitos ses malsamaj kafejojn.

Ni povas legi ankaŭ pri la aliaj kluboj en kaj ĉiorkaŭ la ĉefurbo: en Väsby, en Södertörn kaj la laborista klubo. Finfine ni legas la svedan tradukon de "Stokholmo en la kor". Ĝin tradukis la eksredaktoro de La Espero, Jan Setréus.

En la Jarraporto de SEF ni legas: Norrköpings Esperantoklubb aranĝis sep monatkunvenojn, kiuj samtempe estis kulturarangĝoj de la studorganizo NBV. Partoprenis inter 13 kaj 28 partoprenantoj. La plej granda el tiuj aranĝoj estis publika programo kun Ĵomart, Nataša kaj Karina dum la Kultura Nokto de Norrköping. Al la esperantoagado en Afriko la klubo kontribuis per ĉ. 5000 kronojn. En Katrineholm Agneta Emanuelsson kaj Roland Eriksson estis tre aktivaj i. a. dum ĝemelurba renkontiĝo kiam ili gastigis plurajn danajn kaj finnajn vizitantojn.

Levande språk, döda språk och planerade språk.

I LMS Lingua - tidskrift för Lärarna i Moderna Språk, LMS, kommer en artikel om Esperanto, skriven av Siv Burell. La Esperos läsare få här läsa samma artikel. Kanske någon kan skriva en artikel om Esperanto i någon annan tidskrift?

Under min skoltid var engelska, tyska, franska och latin de språk som vi latinstudenter lärde oss. Lärde? Tjaa - tillräckligt för att bli fascinerade av stämningen i romerska kärleksdikter, i Iliaden och Odysseen och – tyvärr – spänningen i en massa krigsskildringar. Med hjälp av grammatik och lexikon kunde man oftast reda ut vem som besegrade vem.

Jag kan förstå Ola Wikander, som med förtjusning studerat sumeriska, akkadiska, hebreiska, koptiska, sanskrit, oskiska, etruskiska och några till. Med språk följer historia. Jag hade förmånen att höra den unge forskaren, då han höll föredrag om sin bok I döda språks sällskap på Redbergsteatern, Göteborg. Tidsperspektivet ändrades. Dåtidens människor kom nära oss.

De levande språken har jag inte lika starka minnen av. Det mesta handlade om vardagen, om att stiga upp, klä på sig, äta frukost och kanske ta sig till Trafalger Square. eller Tour Eiffel, värdefulla kunskaper i sig.

I en globaliserad värld behöver vi ett världsspråk. Engelskan har ju tagit på sig den rollen, vilket innebär att engelsktalande länder sparar miljarder på att barnen där är födda med ett "världsspråk". I över 60 länder är engelskan ett officiellt eller halvofficiellt språk och det har en framträdande plats i ytterligare 20. Det är väletablerat på alla kontinenter.

Att försöka lansera något annat språk som världsspråk skulle vara svårt. Men försök görs åtminstone ha ett parallellt världsspråk.

Vilka krav kan ställas på ett världsspråk? Det ska vara politiskt neutralt, lättlärt, det ska ha ordstammar som känns internationella, stavning och uttal ska följas åt, det ska vara flexibelt och nyansrikt. Esperanto fyller alla dessa krav. Det är inte ett hot mot de nationella språken – kanske t.o.m. en genväg att lära sig språkliga strukturer. Många har anfört esperantos propedeutiska effekt på annan språkinläring, men några större veten-

skapliga försök har knappast gjorts. Erfarenhetsmässigt vet man emellertid att japaner, som först lärt sig esperanto och därefter engelska har snabbare lärt sig engelska än japaner som har gått direkt till engelskstudier.

Med neutralt internationellt språk skulle risken av ett vi-och-dom-tänkande minimeras. Redan vid Nationernas Förbunds första sammanträde föreslog 11 delegater att man skulle införa esperantoundervisning i medlemsländerna. NF utsåg en kommission som skulle undersöka esperanto. Kommissionen kom fram till att esperanto borde vara officiellt språk i NF. Det meddelades bl.a. att man under tre dagar på en internationell esperantokongress hade utfört samma mängd arbete som på en vanlig flerspråkig, internationell konferens skulle ha fordrat 10 dagar. Rapporten väckte intresse och många länder var för införandet av esperanto som officiellt språk, men då Frankrike kraftigt motsatte sig förslaget av rädsla för att franskan skulle förlora sin officiella ställning, svängde majoriteten och 1923 avslogs förslaget. Dock antogs en resolution i vilken rekommenderades att medlemsländerna skulle använda esperanto som "hjälpsspråk" vid internationella kontakter. Man rekommenderade också att man skulle använda esperanto vid telegrafering p.g.a. dess klarhet.

Sedan dess har esperantorörelsen haft både med- och motgångar. Svagheten och styrkan är att språket saknar politiska bindningar och officiell ställning. Samma grupper som arbetar för rättvis handel, konfliktlösning genom samtal, allas rätt till utbildning osv. skulle i esperanto finna ett rättvist språk som inte favoriserar någon nation. London och Wien har esperantosamlingar i storleksordningen 18000 – 40 000 olika titlar inklusive tidskrifter. Göteborgs Stadsbibliotek, som har Sveriges största offentliga esperantosamling, har 750 titlar.

Det som fascinerar mig är att jag kan läsa tidskrifter och böcker från hela världen på esperanto utan filtrering genom något nationellt språk. Det kan vara en lärobok från Togo, en diktbok från Kina, en antologi av en rysk invandrare i USA, en reseskildring från alla världsdelar av ett par

australiansare eller en sångbok eller video från Brasilien. Dessutom finns det på nätet. På www.edukado.net är det just nu framför allt ungerska studenter som söker brevvänner i världen. Sydkorea har ca 400 som läser esperanto vid universitet. I Brasilien ökar antalet esperantotalande ganska rejält. Sverige är tyvärr inget stort esperanto-land, men det är ju inte för att kommunicera med svenskar man studerar esperanto. På Umeå universitet ges för tredje terminen en distanskurs på 5 poäng, nu för bara 15 personer, varför kursen är hotad.

Esperanto var 1887 verket av en enda person, L-L. Zamenof. Fredstanken var drivkraften, då språket kom till. Det har sedan utvecklats och spritts från land till land och används idag i ca 120 länder. Det finns kurser, diskussionsgrupper och kursgårdar spridda över världen. På de årliga världskongresserna brukar esperantotalande från ett 60-tal länder samlas under en vecka.

I år blir det Yokohama som är värd, 2008 är det Rotterdams tur osv. Esperantolärarna brukar ha sina sammankomster i samma land som världskongresserna och så blir det i år, men för att stödja sina kollegor i Benin, har esperantolärarna bestämt sig för att 2008 förlägga sin konferens dit.

Pröva esperanto, ett spännande språk med en spännande internationell kultur!

Esperanto är verkligen ett gränsöverskridande språk.

Siv Burell, Lerum



I Sveriges Esperantisternas Ungdomsförbund är hemsidan och internet viktigt för kommunikationen. Magnus Henoch, som är ordförande, har meddelat att länkarna nu är uppdaterade: <http://www.tejo.org/seju/ligiloj.shtml>

Akademia konsultejo

La Akademio de Esperanto ĵus reorganizis sian konsultejon, kiun provizore, ĝis la elekto de nova direktoro, prizorgas akademiano Boris Kolker. Pli frue la konsultejon prizorgis Stefan Maul.

La Akademio de Esperanto en 1999 starigis la Konsultejon de la Akademio, al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto per difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon.

Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la komisiono promesas respondi relative rapide; ĉe komplikaj gramatikaj problemoj kutime daŭras pli longe. La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la membroj de la Sekcio.

"Tamen la Akademio esperas ke utilas tiu ĉi rapida servo, kiel pruvis la praktiko de la lastaj jaroj, kiam la Konsultejon gvidis Stefan Maul", skribas la Akademio en sia oficiala komunikilo.

Demandojn al la konsultejo de la Akademio eblas sendi tra reta demando-formularo.

La Sekcio Konsultejo petas ke oni ne sendu simplajn demandojn, "kiujn povas respondi ĉiu sperta esperantisto, serĉante en vortaroj kaj aliaj konsult-libroj".

Ségolène Royal promesis esplori

Tuj antaŭ la decida dua voĉdonado en la elekto de la franca prezidento, Ségolène Royal decidis sekvi la ekzemplon de la nuna prezidento Jacques Chirac. Responde al letero de franca esperantisto, la maldekstra kandidato Ségolène Royal promesis esplori sur la plej alta nivelo la demandon pri enkonduko de Esperanto en la oficiala eduk-sistemo de Francio. Ŝi skribas:

"Kun multe da atento mi konatiĝis kun viaj argumentoj favore al tiu lingvo. Se mi estos elektita al prezidenteco de la Respubliko, en venonta majo, mi tuj kunvenigos Ĝeneralajn Statojn [t.e. reprezentantojn de sociaj grupoj] por debati kun ĉiuj lernejoj agantoj kaj partneroj pri la estonteco de la eduk-sistemo, kiu reprezentas, miao-

pinie, absolutan prioritaton de mia politika agado. En tiu kadro, la sugesto pri enkonduko de Esperanto, kiel instruobjekto, estos pritraktata.

www.liberafolio.org

Novaĵoj el Tanzanio

En La Espero 2007:2 ni raportis pri vigla agado en Tanzanio. Nun ni povas kompletigi la raporton per letero de Mramba Simba:

Mi volas informi vin ke la distriktoj akceptis niam peton pri konstruado de duagrada lernejo nome Esperanto Secondary School La komunumo de mia Kvartalo, kiun mi gvidas, pretas kontribui al ĝia konstruado kaj la registaro pagos la salajrojn al instruistoj. Esperanto ankaŭ estos deviga lingvo, kiun gestudentoj devos lerni ĉiutage kiel oficialan lecionon. Nun mi preparas la buĝeton por konstruado de klasĉambroj, instruistaj loĝejoj, necesejo ktp, kaj mi prezentos ĝin al Esperantistoj kiam mi vizitos Eŭropon ekde la fino de Majo 2007.

Ni petas monsubtenon por ke ni sukcesu aĉeti la materialojn por konstruado. Kiu interesiĝas pri tiu projekto, povas sendi sian helpon al la konto de Esperanto Secondary School ĉe UEA (essm-z).

Selten pri Esperanto en la EU-parlamento

Pro la Tago de Eŭropo la 9-an de majo, dek tri nobelpremiitoj estis invititaj en la Eŭropan Parlamenton. Inter ili troviĝis la esperantisto Reinhard Selten. Li estis prezentita de la prezidanto de la Parlamento kiel esperantisto, kaj li mem levis la demandon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto dum sia parolado. Laŭ li, kelkaj interesitaj EU-landoj povus komune interkonsenti pri lerneja instruado de Esperanto, kaj pliaj landoj povus aldoniĝi poste. "La lingvo estas grava parto en la evoluigo de eŭropa identeco. Nun ne ekzistas taga gazeto, kiun oni legus ĉie en Eŭropo", diris Selten. La 16-an de majo la Eŭropa Parlamento publikigis filmeton pri la vizito de la Nobel-premiitoj. La filmo

ekzistas nur en la angla lingvo, kaj la plej grandan spacon ricevas anglalingvaj Nobel-premiitoj.

Laŭ la unua oficiala komunikilo de EU Reinhard Selten emfazis la rapidan ekonomian integriĝon de Eŭropo en la lastaj kvindek jaroj kaj diris ke la sukceso de la mona unuigo estis "io neimagebla". Grandparte tio laŭ li ŝuldiĝas al "la sendependeco kaj engaĝiĝo de la Eŭropa Centra Banko".

Poste Reinhard Selten konstatis, ke la ekonomia integriĝo ankoraŭ ne estas kompleta, kaj laŭ li, por tio oni unue devus lerni "sin senti eŭropanojn". La ĉefa problemoj rilate tion laŭ li troviĝas en la lingva baro, kaj necesas solvo longperspektiva kaj justa.

- Neniu lando rajtas malĝajni, li opiniis.

Do, neniu lingvo laŭ Reinhard Selten devus havi superecon super alia. Konsekvence, li alvokis al la lernado kaj uzo de Esperanto. Laŭ Selten, temas pri lingvo "facile lernebla" kaj li proponis ke en la landoj de la EU oni studu Esperanton kiel la unuan lingvon.

- Kelkaj landoj povus komenci la instruadon kiel pilot-projekton, kaj poste aliaj landoj povus sekvi, proksimume kiel okazis pri la Schengen-kunlaboro kaj pri la mon-unio, li proponis, laŭ la sveda versio de la oficiala komunikilo.

Laŭ Hannariikka Nieminen ĉe la gazetara servo de la Eŭropa Parlamento, skriba versio de la parolado de Reinhard Selten ne haveblas. Ŝi mem aŭskultis la paroladon, kaj laŭ ŝi Reinhard Selten "tre entuziasme" argumentis por Esperanto.

Pri Esperanto Reinhard Selten laŭ ŝi diris, ke interesitaj landoj povus fari interkonsenton pri instruado de Esperanto, kaj aliaj landoj povus aliĝi poste, same kiel pri la Schengen-interkonsento kaj la komuna mono. Kvankam la hispanlingva gazetara komunikilo povis ŝajni aludi ion alian, Selten efektive diris, ke Esperanton indus ekstudi kiel la unuan fremdan lingvon, rakontis Hannariikka Nieminen al Libera Folio la 15-an de majo.

- La lingvo estas grava parto en la evoluigo de eŭropa identeco. Nun ne ekzistas taga gazeto, kiun oni legus ĉie en Eŭropo, konkludis Reinhard Selten intervjuon, kiu aperis en la retejo de Eŭropa Parlamento la 16-an de majo.

www.liberafolio.org

KALENDARO 2007

24-30 junio **Someraj kursoj** en Esperanto-Domo. Malnovaj amikoj kaj novaj studos diversnivele, infanoj kiuj ĉiujare venas lernos kaj ludos, helajn vesperojn plenigos muziko kaj danco kaj ni iun tagon ekskursos al vidindaĵo kaj strando. Krom la kutimaj lingvaj kursoj, ni organizos en 2007 esperantologian seminarion. Ricevu rabaton se vi venas kun infano(j). Ankaŭ tendumi eblos. www.e-g.se
14 - 22. julio **43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj** (BET-43) en nordlitovia urbo Siauliai. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, rete: litova.ea@mail.lt

21 - 26. julio **BEF-4 (Balta Esperanto-Forumo)** en Kaliningrado (Ruslando). Inf: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando, Tel.: +7-4012-656033 Rete: sezonoj@gazinter.net aŭ sezonoj@yandex.ru

21 - 28. julio **18-a Ekumena Esperanto-Kongreso 2007**, 60-a kongreso de IKUE, kaj 57-a kongreso de KELI en Pelplin, Pollando. Inf: Eichkorn, Bernhard aŭ Kozyra, Eduard, PL-83-130 Pelplin, Strzelnica 8 esperanto@powiat.malbork.pl aŭ [Jadwiga.Wasiuk](mailto:Jadwiga.Wasiuk@wp.pl)

23- 27. julio **Esperanto-kursoj** (elementa kaj por progresantoj) en la Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ebleco kunvojaĝi ŝipe al festivalo Arta Lumo. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, sekretario Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, Finnlando tel. +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi

27. julio - 1.aŭgusto **Festivalo Arta Lumo**, Kuopio, Finnlando. Multflanka kultura arango kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo. Antaŭekskurso al la monaĥejo Valamo de kie ŝipvojaĝo al Kuopio. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando, ArtaLumo@esperanto.fi

28. julio - 3. aŭgusto **Internacia Junulara Kongreso** en Hanoi, Vjetnamo

1 - 8. aŭgusto **Internacia Junulara Semajno**, IJS en Hungario. Inf: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario. ijs@ijs.hu

4 -11. aŭgusto **92-a Universala Kongreso de Esperanto** en Jokohamo, Japanio. Inf: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +3110-4361044, fakso: +3110-4361751. Rete: uea@inter.nl.net
11 -19. aŭgusto 40-a **Konferenco de ILEI** en urbo Ranzan, Japanio. Inf: ILEI.ru

29. septembro-6. oktobro **15-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo** Tossa de mar, Girona, Hispanio

www.eventoj.hu kaj aliaj

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO INVITAS AL SEMINARIO PRI AKTUALEGA TEMO:



SVEDA
ESPERANTO
INSTITUTO

"Savu la mondon!" – pri futurkapabla evoluo.

Prelegos inter aliaj Sebastian Kirf el Germanio:

"Esperanto – ĉu kontribuo por la realigo de la Agendo 21?"

Loko: Esperanto-Gården, Lesjöförs

Tempo: 6 – 7 oktobro 2007

Pli da detaloj troveblas sur nia hejmpaĝo:

www.SvedaEsperantoInstituto.4t.com

Svenska Esperantolärares förening ordnar i samarbete med BILDA:

ESPERANTO-helg i Mullsjö 3-5 augusti 2007

Nybörjarkurs, fortsättningskurs, konversation/tolkkurs .

Snabba nybörjare, t.ex. språklärare, kan bilda en egen intensivgrupp med Bertil Nilsson, Stockholm. Bertil är lärare, författare och översättare till och från esperanto.

Plats: Marston Hill, Mullsjö, nära Jönköping

Fredag 3 augusti

kl. 10 – 12 Ankomst, uppäckning, information, gruppindelning

kl. 12 Lunch

kl. 13- 15 Lektioner i grupper

kl. 15 Kaffé / Frukost

kl. 15.30 Promenad i kursbyn.

kl. 17.00 kvällsmat

kl. 18.00 temaarbete

kl. 20.00 gruppredovisning

kl. 21.00 te, allsång

Lördag 4 augusti

kl. 07.00 Enkel gymnastik för morgonpigga

kl. 08.00 Frukost

kl. 09.00 Lektioner i grupper

kl. 11.30 Vi sjunger tillsammans

kl. 12.00 Lunch

kl. 13.00 Lektioner

kl. 15.00 Utflykt

kl. 17.00 Kvällsmat

kl. 18.00 Temaarbete

kl. 20.00 gruppredovisning

kl. 21.00 te, allsång

Söndag 5 augusti

kl. 07.00 Enkel gymnastik för morgonpigga.

kl. 08.00 Frukost

kl. 09.00 Lektioner i grupper

kl. 12.00 Vi sjunger tillsammans. Lunch

kl. 13.00 Lektioner / tema

kl. 15.00 Kaffé, utvärdering, på återseende!

Övrigt: Vandrarslemsstandard. Ta med lakan och handdukar.

Det går bra att komma med husvagn.

Ca 1 timmes resa med tåg från Göteborg till Mullsjö.

Kostnad för hela paketet beräknar vi till ca 700:-. För "pendlare": 400:-
Upplysningar och anmälan: Siv Burell 0302-411 49 siv.burell@telia.com

TRA LA MONDO

En Pekina Universitato

De la pasinta semestro Esperanto-kurso funkcias posttagmeze de vendredo en la Pekina Normala Universitato (PNU).

De la pasinta semestro Esperanto-kurso funkcias posttagmeze de vendredo en la Pekina Normala Universitato (PNU). Ĝi funkcias kiel fakultativa leciono por studentoj. La kurso kun pli ol 40 studentoj en tiu ĉi semestro estas gvidata de Zhou Liuxi, profesoro de PNU kaj vicestro de la

Instituto de Fremdlandaj Lingvoj kaj Literaturo sub tiu ĉi universitato.

Inter la studentoj estas Lee Sun-kyung, filino de Lee Young-koo, prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio. Lee Sun-kyung nun lernas la ĉinan lingvon en tiu ĉi universitato. La studentoj akiras 2 lernopontojn se ili trapasos ekzamenon. La lernolibro estas "Moderna Esperanto" kompilita de Li Weilun, prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj vicprofesoro de la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato.

Finnoj jubileis

La 28an de aprilo Esperanto-Asocio de Finnlando festis sian 100-jariĝon en la Nobelara domo en Helsinko.

La Espero gratulas!

HUR MÅNGA ESPERANTISTER?

Den finske lingvisten Jouko Lindstedt har publicerat följande uppskattning:

- * 1 000 infödda talare (flerspråkiga).
- * 10 000 kan tala esperanto lika väl som de talar sitt förstaspråk.
- * 100 000 kan använda esperanto i skrift och tal.
- * 1 000 000 kan förstå talad och skriven esperanto på en acceptabel nivå.
- * 10 000 000 har bekantat sig med esperantos grunder.

ANEKDOTO

Du viroj bierumas. Unu demandas:

- Kio estas logiko?
- Hm... Kiel mi tion klarigu al vi... Jen vidu, iras du viroj, unu estas malpura, la alia estas pura. Kiu iras en banejon?
- La malpura...
- Ĝuste. Li estas malpura kaj tial iras laviĝi. Jen estas logiko.
- Sed kio estas dialektiko?
- Hm... Jen vidu, iras du viroj, unu estas malpura, la alia estas pura. Kiu iras en banejon?
- La malpura...
- Tute ne! La pura! Ĉar la malpurulo estas tia ĉar li neniam laviĝas. Jen estas dialektiko.
- Bone, sed kio estas filozofio?
- Jen vidu, iras du viroj, unu estas malpura, la alia estas pura. Kiu iras en banejon?
- Diablo scias!
- Jen! Estas ĝuste filozofio.

Lyssna på Esperanto!



Lyssna på esperanto! CD med texterna i läroböckerna Jen nia mondo 1-2 finns nu till det facila priset 85 kr. Sätts in på postgiro 578-5, Esperantoförlaget.

La plej bona loko.

Daŭriĝo de paĝo 2.

Ĝi estis la unua esperanta rapidmanĝejo kaj ni surtabligis nur mole boligitaĵojn. La ovo kun ĝia kompakta formo kaj ĝia uziĝo en nekalkuleblaj diversaj pladoj ĉie en la mondo estas reprezentata por koncepto de esperanto, kiu estas ankaŭ imanta en la arkitekturo de la naturo. Tiun koncepton Ovo aplikis al la fenomeno de rapidmanĝejoj. Ĝi transprenis la formon de hodiaŭa pragmata ekonomiado (modelo McDonald's) kaj plivastigis ĝin je la valoro travidebleco. Tio signifas, ke la kliento scias, kion li manĝas kaj de kie ĝi originas, jen la natura, perfekta rilato inter homo kaj lia manĝaĵo.

Kolbasoj sen limoj estas kolbasfirmao, kiun ni lanĉis en Rejkjaviko. En Islando la hotdogo fariĝis preskaŭ la nacia plado. La islandanoj fiere manĝas siajn naciajn kolbasojn, precipe la 17an de junio, kiu estas la nacia tago. Ni volas oferti alternativajn kolbasojn; kolbasojn kiuj ne reprezentas landon. Tial ni lanĉis Kolbasojn sen limoj. Krome niaj kolbasoj estas faritaj el islanda ŝafviando. Tiel ili estas turnopunkto en la kolbaskulturo, kiu estis asociita kun meza kvallito kaj la stato de stratmanĝaĵo. Ni lanĉis la projekton en la Viva ArtMuzeo en Rejkjaviko la 17an de junio, la nacia tagon mem. Ĉiuj ĉeestantoj havis la eblecon gustumi la kolbasojn. Nia malferma parolado estis bele tradukita el esperanto al la loka lingvo per loka esperantisto.

Por la magazino Der Freund ni kreis lingvokurson La rekta metodo. La kurso donas ne nur gramatikajn regulojn de esperanto sed ankaŭ kontinuitatan rakonton. En ĝi eblas interpreti moralajn kaj sociopsikologiajn enhavojn. La celgrupo de la kurso do estas tiuj, kiuj scivolas pri la lingvo kaj tiuj, kiuj interesiĝas pri demandoj de moralo kaj homa psiko/socio.

Unu el niaj plej ŝatataj projektoj estas nia taja-esperanta amikeco-konferenco. Per tre limigitaj rimedoj, ni aranĝis konferencen promociantan esperanton en Tajlando. Esperanto estas preskaŭ tute nekonata en Tajlando, tial aranĝi tian eventon estas defio. Per malmultaj fortaj simboloj kiel flagoj, interpretistoj kaj speciale farita kuko, ni sukcesis fari ion, kio aspektis sufiĉe formala, kio similis al diplomata kunveno. Kvankam la projekto estis iom humura, ĉeestintaj ĵurnalistoj skribis seriozajn artikolojn pri esperanto kaj ĝia ebla bonfaro por Tajlando.

Kiel viaj artistaj kolegoj rilatas al via intereso pri Esperanto?

Ne eblas ĝeneraligi tion. Kiel esperantistoj, kelkaj artistoj havas iomete

vivforan pensmanieron kaj trovas la lingvon interese kaj inspiriga teorio, sed ne vidas ĝian realan, vivantan dimension. Aliaj opinias, ke ĝi estas tro simpla por servi kiel arta modelo, kaj misvalidas ĝin. Ni moviĝas inter tiuj du vidpunktoj, tenante al ambaŭ la plejble grandan distancon.

Kvankam vi estas duopo, evidente ĉiu el vi havas siajn proprajn interesojn, kiujn?

Ni estas artistoj. Arto reflektas kaj prilaboras ĉiujn aspektojn de la vivo. Estante la medio, en kiu formiĝas arto, ni efektive interesiĝas pri ĉio. Artistoj estas perilo, tra kiu fluas informoj, kiujn li prilaboras kaj kiujn prilaboras lin. Je la fino elvenas produkto, kiu diversas de persono al persono. La diferencoj do serĉindas en la maniero, ne en la temoj. Sed tion ni ne esploris, ĉar tro da kognitiva reflektado ĝenas artajn procesojn, kiuj laboras per la ekvilibro de ĉiuj ebenaĵoj de la konscio.

Kio por vi estas Esperanto?

Ni forte kredas, ke esperanto, la lingvo kaj ĉio, kio ĝi estas krome, povas plibonigi la mondon. Ni uzas ĝin en nia arto kiel metodikan modelon kaj per ĝia ekzemplo ni malkodas la gramatikon de ekzistantaj aĵoj. En ĝia konstruamano evidentiĝas al ni la interna strukturo de la mondo. Tiu-sence ĝi estas la plej natura lingvo, kiu ekzistas. Kaj ĉi tian koncepton ni aplikas al niaj produktoj; kiel esperanto ili estas universalaj, belaj, simplaj, funkciaj, egalecaj, demokratiaj, direktaj kaj amikaj. Ĝi do utilas al ni kiel modelo sed ni ankaŭ kontribuas al ĝi, esplorante novajn ebenaĵojn kaj dimensiojn, aplikante ĝin al novaj vivterenoj kaj taskoj. Nur per aplikado, servado kaj utiligado esperanto povas plivastiĝi kaj evolui de virtuala revmondo al reala vivkadro.

Ĉu arto povas esti facila kiel Esperanto?

Arto ĉiam estas tiom facila, kiom ĝia ricevanto. Same kiel esperanto, ĝi en si mem estas nenio, kio enhavas ĉion. Nur per la interpretado/uzado de la ricevanto povas iĝi io kaj ricevi signifon. Arto estas facila ĉar neniu bezonas ĝin. Ĝi estas tute libervoldependa kaj estas la plej alta ŝtupo de homa vivado/pensado. La kulminpunkto de tio estas perfekta simpleco, travidebleco, egaleco kaj universaleco. Same kiel esperanto, ĉiuj artaj esprimoj estas orbitoj, kiuj nekonstante cirkulas pli aŭ malpli proksime ĉirkaŭ tiu stato.

La intervjuo aperis en:
La Ondo de Esperanto, 2007:3.